



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 5 • Septembro/Oktobro 1958

La Germana Federacia Fervojo okupiĝas en la Universala Kongreso de Esperanto

La Germana Federacia Fervojo ne preterlasis la okazon, denove prui sian progresemon rilate la lingvon Esperanto. Laŭ instigo de la Germana Esperanta Fervojista Asocio la fervoja administracio konsentis fari kelkajn arandojn. Por saluti kaj konsili la kongresanojn, alvenantaj per fervojo, estis instalata speciala akceptejo en la ĉefstacio Mainz, en kiu deĵoris dumtage kaj dumnokte fervojistoj, donante la unuajn informojn kaj helpon al la eksterlandaj gastoj, kompreneble ĉio en la Internacia Lingvo.

Tiu ĉi servo danke estis akceptata, ĉar tiamaniere la fremduloj sentis sin malpli fremdaj. Tiel la Germana Federacia Fervojo montris sin kiel helpanto por ĉiu.

En la kongresejo intertempe estis konstruita belega informejo flanke de la fervoja direkcio Mainz. Jam dum semajnoj oni estis preparinta ĉi tiun projekton, kiu nun fine realiĝis — oni nur povas diri — en brila maniero. Varbafiŝoj ekster-kaj enlandaj, modelo de transeŭroptrajno, aŭtomate moveblaj afiŝoj kaj kolorbildoj ornamis la fervojan standon en la kongresejo. La granda, longa tablo, malantaŭ kiu seninterrompe deĵoris du ĝis tri fervojistoj en uniformo, estis kovrita per blua drapo. Sur ĝi kuŝis horaroj el tuta Eŭropo, varbfolioj, faldprospektoj, kaj la multnombraj kongresanoj, daŭre starantaj antaŭ la giĉeto, pruis, kiel forte ili bezonis la fervojajn informojn.

Sennombraj kaj ĉiaspecaj estis la informpetoj dum tiuj tagoj. Same kiel la petantoj venis el la tuta mondo, same la petoj estis ĉiurilate internaciaj. Ĉu estis mendoj de sidlokoj aŭ de litoj por noktvojaĝo, ĉu oni petis informojn pri vetureblecoj al ĉiuj direktoj de Eŭropo aŭ pri veturprezoj en-kaj eksterlandaj, ĉu oni deziris klarigojn pri la surrejna ŝipveturado aŭ petis proponojn pri ekskurseblecoj en la malpli aŭ pli vasta ĉirkaŭaĵo, por ĉio la afablaj deĵorantoj sciis konsilojn kaj klopodis helpi. Ja ankaŭ pri vizaj kaj pasportaj aferoj kaj pri la ebleco de flugvojaĝoj oni demandis la kolegojn. Entute oni mendis pli ol 160 sidlokojn al ĉiuj eŭropaj landoj, el kiuj 70 estis realigeblaj.

Merkredon la fervojistaj kongresanoj havis sian „grandan tagon“. Matene ili fakekskursis al la plej moderna eŭropa signalregadejo en Frankfurt ĉefstacio. 40 partoprenantoj el 8 nacioj aŭskultis la interesegan prelegon pri la centra, aŭtomata funkciigado de la fervoja trafiko en tiu giganta fervoja centro. Ili havis okazon, mem observi la tieajn deĵorantojn dum ilia laboro. Dum la sama tago posttagmeze la fervojistoj en la kadro de internacia fakkunsido de IFEF denove kunvenis kun 60 ĉeestantoj el 9 nacioj kaj aŭskultis altnivelan prelegon pri la temo „Raciigado, modernigado, aŭtomatigado ĉe la fervojo“, tradukita artikolo de fervoja prezidanto Geitmann.

Dum la ekskursita tago ĉiuj deĵorantoj de la fervoja informejo akompanis la specialan trajnon al Heidelberg kaj Michelstadt, survoje helpante kaj konsilante la esperantistajn pasaĝerojn, kiuj post la eks-

kurso adiaŭis de ili kun vortoj kiel jenaj: „Unue ni iom timis viajn seriozajn uniformojn, sed poste ni ekkonis, ke vi ne nur estis tre afablaj helpantoj, sed eĉ kavaliroj en la dancvagono.“

Fine oni ne silentu pri tio, ke la Germana Federacia Fervojo oficiale delegis kaj pagis 6 deĵorantojn dum la tuta semajno, ke ili portis sur la maldekstra maniko orkoloran rubandon kun la enskribo „Esperanto“, kaj ke ili ĝisfunde konis sian fakon, tiamaniere bonege reprezentantaj la germanan fervojon kaj la esperantistojn fervojistajn.

Krome, „Esperanto-Filmo Germanujo“, en kiu preskaŭ nur kunlaboras fervojistoj, prezentis en Mainz por la unua fojo antaŭ pli ol 1000 rigardantoj la sonfilmon „De Braunschweig al Harz“, kiu montras la belajn de tiu regiono. La kongreso en Mainz ankaŭ estas filmita, kaj en nelonga tempo tiu nova filmo estos luebla ĉe Esperanto-Filmo Germanujo“. Same oni povis aŭdi kaj aĉeti en la kongreso la unuan gramofondiskon de „Esperanto-Filmo Germanujo“ kun popolkantoj el diversaj landoj. Granda estis la entuziasmo pro tio. Kelkaj centoj tuj estis venditaj, la provizo preskaŭ elĉerpita. Jen la esperantistoj finfine havas siajn kantojn sur diskoj, eĉ kun teksto aldonita. Demandojn kaj mendojn bv. direkti al la konata adreso: „Esperanto-Filmo Germanujo“, Rudi Biernath, Ackerstr. 53, Braunschweig, Germanujo.

Gießner

La stranga barilo de Geka

La bremsoj akre grincis. La aŭtomobilo haltis antaŭ barilo. Je la palisaro staris gardisto apoganta sin al ĝi.

„Certe la juna paro estas fremda ĉi-tie“, li komencis la konversacion. „Certe vi ferias, ĉu ne?“ — „Ne! geedziĝvojaĝo“ korektis la juna sinjorino ruĝiĝante.

„Ho! Do mi nun rajtas elkore deziri al vi ĉion bonan“ interrompis ŝin la gardisto.

Kaj post tio abundego de lia parolemo elversĝiĝis al la du atendantoj.

En la horizonto leviĝis fulmotondro, la plej proksima vilaĝo estis ankoraŭ fora kaj la tempo pasis. Jen okazis la malfeliĉo. La sinjorino petis la barilgardiston pri glaso da akvo kaj la viro invitis la paron al sia ĝardentablo. Ĉi-tie ili sidis ankoraŭ duonan horon ĝis la s-ro fine demandis, ĉu la trajno havas tiom da malfruo.

„Sed sinjoro“ klarigis afable la gardisto. „Ĉi-tie nur unufoje po tago preterruliĝas trajno kaj tiu jam pasis antaŭ unu horo!“

„Jes — sed —, sed la barilo?“ „Ho, la barilo? Tiun mi fermas tiam kaj iam. Sciu vi, ke ja estas tiel solece tie-ĉi kaj oni ne preterlasas ŝancon por konversacii, precipe ne ĉe tiel agrablaj gesinjoroj kiaj vi estas!“

Trad. el „Morgenpost“
Busse

Instruado per praktika ekzemplo. „Modelveturo de incidentoj“

La sinjoro en la malhela vestaĵo kun maldikaj strioj neniakaze estis iu el la plej junaj. Inter Osnabrück kaj Rheine en la D 3701 li malfermis la kupepordon, salutis kaj diris: „La biletojn, mi petas!“ La tiel alparolitoj montriĝis kiel „modelvojaĝantoj“: Iu kantis, alia ronkis, la tria ŝajnis tion kaj la najbaro ne ĉesis protesti laŭte pro la „malbona ventolado“. Kaj kiaj biletoj estis montritaj: ne validaj, ne plu validaj, malĝustaj. Estis harstarige! „Se tio okazus ĉiutage . . .“, li murmuris kaj viŝis la ŝviton for de la frunto.

Tia „leciono de la praktiko“ estas la kulmino por tiuj, kiuj estas kelkajn semajnojn en la sola fervojlernejo en la distrikto de la direkcio Münster. Poste la lernantoj estos okupataj kiel konduktoroj aŭ trajnestroj. La lernejo peradas dum du-ĝis oksemajnaj kursoj (laŭ kariero) la fundamentajn sciojn, kiujn devas havi trajnestroj respektive konduktoroj.

Sed antaŭ la ekveturado de la trajno la „lernantoj“ (la plej aĝa estas ĉirkaŭ kvardekkvin) kuris laŭlonge de la vagonaro por konstati, ĉu la bremsprocentoj estis sufiĉe altaj laŭ la veturtabelo. Antaŭ ol ĉi tiu skriba kalkulo ne estas transdonita al la lokomotivestro, oni ne povas pensi pri ekveturo. La principo „sekureco antaŭ ĉio“ regas ĉe la Federacia Fervovojo.

La 32 trajnestroaspirantoj kaj la 15 inspektoraspirantoj de la modelveturado post kelkaj minutoj estis transdonintaj la bremsfoliojn al la lokomotivestro. Joviale la estro de la stacio Osnabrück ordonis la ekveturon de la trajno.

Dum la lernantoj ankoraŭ trankvile preparis siajn veturraportojn, juna sinjorino en la unua vagono porforte tiris tiun anson, kiun kutime la vojaĝantoj nur rajtas ekfunkciigi en kazo de danĝero: la danĝerbremsilon. Grinco aŭdiĝis en la trajno. La sinjoroj lernantoj ekkuregis. „Kie estas tirita la danĝerbremsanso? Kiu estas la farinto? Kio estis la kaŭzo?“ Ĉar ĉiu estas sia propra trajnestro, ekzistas multe da kaoso. Poste, en la veturraporto de la trajnestroaspiranto Ricker el Rheine estas skribita mallonge kaj koncize: „Dum la enveturado ĉe la stacio Velpo virino tiris la danĝerbremsilon. La trajno haltis de 9.38 ĝis 9.46“.

9.50 estiĝis la alia fiasko. „Radakso de la unua vagono estas varmega.“ Kion fari? La „trajnestro-lernantoj“ pruvis, ke ili dum la leciono bone aŭskultis. „La vagono devas esti elmetota.“ Do dum kelkaj minutoj el trajnistoj fariĝis aranĝistoj, akurate laŭ deĵorregulo.

Jam pro ĉi tiu dua panco ĉiu ordinara vojaĝanto ĉagrene estus vidinta el la fenestro, sed plej malfrue post pluaj dek minutoj, ĉe Laggenbeck la trajno pro relrompo venis sur aranĝrelparon kaj prepariĝis por „malĝusta veturo“. Pro tio diversaj preparoj estis necesaj: ruĝa, ronda tabulo estas metita sur la lokomotivon, „ordono B“ devas estis skribita trioble. Nur kiam la tuta trajnservistaro tre atente troviĝis sur la observpostenoj, la trajno ekveturis denove ĝis Ibbenbüren.

Tie montriĝis, ke „ĉe posteno 61 malproksima bariero ne povas esti fermata“. Do antaŭ la nomita bariero la trajno denove devis halti. La konduktoroj rapidis al la fervojtransirejo kaj ŝirmis ĝin laŭregule per centiditaj brakoj. Malrapide la trajno ruliĝis trans la vojon. Dum la fervojlernantoj skribaĉis ankoraŭ horon, okazintaĵon kaj specialaĵojn en la formulon, estiĝis terura bruego.

Krak' — Krak' — Krak' —

Krakas kiel en la milito. La lokomotivestro manipulis la rapidbremsilon, la „vojaĝantoj“ saltis al la fenestroj. „Ĉu io eksplodis?“, demandis unu la alian. Jen, tri krak-kapsuloj, unu malantaŭ la alia. Akuta danĝero! „Ĉe Esch-Hörstel troviĝas renversita ŝarĝaŭtomobilo sur la relvojo.“ La kurspersonaro denove prepariĝis por „malĝusta veturo“. Sed ĝi ne okazis. Telefonavoko venis de fervojkondukejo: „La domaĝo intertempe estas forigita.“ Kun kelke da malfruo D 3701 alvenas en Rheine.

Okazis ankoraŭ ne-planita „originalpaneo“.

Dum la reveturado al Osnabrück la kurstrajno estis haltigita ne laŭ programo, sed, ĉar oni forgesis marki la lastan vagonon. Maljuna fervojisto el de sia barierdometo rimarkis la eraron kaj tuj anoncis la aferon. Tio, kio profunde estas lernita, ĉiam bone estas memorebla!

El „Westf. Nachrichten“ de 23. 7. 1958

Tradukis Lorenzkowski

Ĉu aŭroro?

Inter la 8a kaj la 14a de Septembro 1958 okazis en München la ĉijara kongreso de Internacia Fervojista Asocio de Alkoholkontraŭuloj. Per la instigo de GEFA la organiza komitato de la kongreso konsentis, en la eldonita plurlingva gvidilo „Cent germanaj vortoj“ ankaŭ presigi la esperantlingvan tradukon. Krome oni estis preta, kune kun la kongresdokumentoj distribui Esperanto-varbfoliojn.

Esperable multaj kongrespartoprenintoj — instigite per la lingvaj malfacilaĵoj — trovu la vojon al Esperanto.

Ni recenzas!

„Wien hat immer Saison“ (Vieno ĉiam havas sezonon)

Ĉi tiun belan kaj vere alparoleblan prospekton eldonis la turisma oficejo de urbo Vieno. La bonaj kolorbildoj jam elradias la gajecon kaj belecon de ĉi tiu urbo. Sinjoro kortega konsilisto Hugo Steiner per sia vere bona tradukaĵo kompletigis la bildojn rilate historian, komercan, kulturen kaj vivgajan vidpunktojn. Ĉio estas presita sur bona papero. Do, oni varme povas rekomendi ĉi tiun prospekton al ĉiuj, kiuj amas la aŭstrian ĉefurbon. Precipe mi atentigas la esperantistajn fervojistojn, kiuj venontjare dum la IFEF-kongreso en Linz sendube havos la eblecon, viziti Vienon.

„Per la fervojo tra Aŭstrio“

Ĉi tiun vere plaĉan kaj taŭgan esperantlingvan varbilon eldonis la Aŭstria Federacia Fervojo. La prospekto montras per belaj fotoj la modernajn trafikilojn kaj ankaŭ la ravan pejzaĝon de Aŭstrio. Detalaj fervojaj mapoj kaj la bona Esperanto-teksto peras al la fremdulo bonan impreson pri la klient-servo kaj pri la teknike alta nivelo de aŭstria fervojo. La bona papero ankoraŭ substrekas la prosperan efikon. Do, oni vere povas gratuli al la eldoninto. Ĉi tiu varbilo ankaŭ estas tradukita de sinjoro kortega konsilisto Hugo Steiner.

Ambaŭ prospektoj estas riceveblaj kontraŭ respondkuponoj ĉe la Internacia Esperanto-muzeo, Wien I, Hofburg. Aŭstrio

„Saarbrücken, Industrie- u. Grenzstadt im Grünen“

(„Saarbrücken, industri- kaj limurbo inter verdaĵo“)

Ĉi tiu germanlingva prospekto kun esperantlingva enmetaĵo estas eldonita de „Verkehrs- und Presseamt der Stadt Saarbrücken“. Belaj fotoj, presitaj sur bona papero, ornamas ĉi tiun varbilon. Kune kun la teksto ili donas koncizan superrigardon pri la varieco de Saarbrücken. Estas domaĝe, ke la priskriboj de la bildoj ne estas presitaj en Esperanto. La esperantlingva teksto mem estas kontentige tradukita. Do, ĝi estas altirebla prospekto, kiu certe havos bonan sukceson.

Interesuloj senpage povas mendi ĝin ĉe s-ro Jakob Schenkel, Am Ziegenhof 30, Neu-Aschbach/Saar, Post Klausthal, Germanujo.

(Rimarko: Kvankam la prospekto senpage estas ricevebla, estas ja honorafero, aldoni laŭeble respondkupanon aŭ reafrankon.)

Bode

Nürnberg atendas vin okaze de

2a kunveno de GEFA

la 11 an kaj la 12 an de Oktobro 1958

Redakcio: Paul Steinig, Bremen, Ausbesserungswerk. Deĵoradreso: TBOI Steinig, AW Bremen, Basa Bremen 835/348. Manuskriptojn bonvolu sendi skribitajn se eble per skribmaŝino unu kaj duonliniajn al la redakcio, tradukaĵojn kun la originala teksto. Sendilmo por manuskriptoj 1. I., III., V., VII., IX., XI.

Preso: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn